

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

majo - junio 2005 • numero 75 | volumo 13 - numero 3



Ĉinio
1987



Aŭstrio 1987



Insulo de la Rozoj
1967



Kroatio
1997



Aŭstralio
1986
vidu paĝon 22



Aŭstrio 2005
La plej nova esperanta
poŝtmarko



Surinamo
1987



Jugoslavio 1953



Pollando 1959

Belgio
1981



esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ

Numero 75 • Vol 13.3 • Majo–Junio 2005

Redaktoro: Donald Broadribb

ELDONADO

Ĉi tiu numero estis preparita de Donald Broadribb, per komputilo iMac, per uzo de la programo Pages, kaj la tiparoj Futura, Onyx kaj Times New Roman.

ABONOJ KAJ PASINTAJ NUMEROJ

Abonprezo: \$A30.00. Pagu al:

Libroservo de AEA

143 Lawson St

Redfern NSW 2016 • Aŭstralio

libroservo@esperanto.org.au

Por membroj ekstraj ekzempleroj de *ĜJK* kostas A\$3.00+poŝtsendokosto.

Pasintaj numeroj ankaŭ surrete elŝuteblas el: <http://www.esperanto.org.au/>

ĜJK estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj ĉe la lasta paĝo de ĉi tiu eldono.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643

York WA 6302

Aŭstralio

☎ (08) 9641 1937 • 📠 (08) 9641 1134

sudakruco@westnet.com.au

Pri la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn de AEA, aŭ de NZEA.

© 2005 AEA & NZEA. Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

La grafikan aspekton de *ĜJK* preparis Igor de Oliveira Couto.

En Ĉi Tiu Numero

Religio lerneja (de Terry Manley).....	3
La tekruĉoj de Suna Angulo Strikas! (rakonto por infanoj, de Tony Peterson).....	4
Unuaj travivaĵoj en Japanujo (de Jennifer Bishop).....	9
Deziras korespondi.....	11
Rozkolera aŭroro (de Vera Payne).....	11
Laŭ mia vidpunkto: La ĉefaj obstakloj de progreso (de Johano Petik).....	13
Unujara kaj elŝutebla <i>Katalogo</i> kaj <i>Jarlibro de UEA</i> per Interreto.....	15
Skribas la legantoj: Paul Desailly.....	16
Brian Fox.....	16
Franciska Toubale.....	17
El Viktorio (raportas John Adams).....	18
En Adelajdo reklamiloj dupiedaj kaj flugantaj (de Katja Steele).....	19
La nova estraro de AEA (fotoj).....	20
Recenzo: <i>Malgrava historieto pri mia vivo</i> de Bob Felby (recenzas Marcel Leereveld).....	21
Esperanto en aŭstralio poŝtmarko 1986.	22
Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de AEA en Adelajdo januaro 2005 (raportas Miranda Lutz).....	23
Ni havas familion! (de Katja Steele).....	29
Informoj pri <i>ĜJK</i> , AEA, NZEA.....	31

SUR LA KOVRILO

Jam de multaj jardekoj diversaj landoj eldonas poŝtmarkojn pri, kaj en, esperanto, plejparte por memori internaciajn esperanto-kongresojn aŭ specialajn esperanto-eventojn. Sur nia kovrilpaĝo ni montras diversajn tiajn poŝtmarkojn.

Tre interesa estas la aŭstralio poŝtmarko eldonita en 1986 kun teksto en Esperanto. Detalojn vi trovos sur p.22 de ĉi tiu *ĜJK*.

RELIGIO LERNEJA

DE TERRY MANLEY

La daŭre doloranta ŝultro de Lunulo, (tiel nomata de liaj samlernejanoj), maldormigis lin. Li kuŝis surdorse, kvazaŭ meditante, kalkulante enspirojn en sia lito. Tamen la menso flirte vagis tien reen, nepermesante reendormiĝon. Ia prapenso knabaĝa de ŝultrodoloro memorigis lin pri rugbia batalo inter lia lernejo kaj loka klubo.

Dum tiu fora vintro la loka klubo venkis ĉiujn aliajn en la regiono. Do estis preskaŭ mirakle, ke la knaboj el lernejo Sankta Mario konkuris en la decidiga finludo de la sezono. Sed Frato Vinĉento kredis je mirakloj kaj por tiuj li multe preĝis... Kaj foje iel nekutime. Dum batalo mezsezona Frato Vinĉento, ĉe la flanklinio, kriegis al la arbitracianto, “Metu tion en vian po...po...po...poŝon.” Vere nekutima preĝo por ekleziano. Tamen li tiom koleriĝis pro la decidoj de la arbitracianto, kiu estis la patro de la alia teamestro.

Sed estas ja mirakloj, kaj iĝis heromito de la lernejo, ke Sankta Mario venkis en tiu finludo. El tridek knaboj ili devis surarenigi teamon de dek kvin konkurstantoj, do iuj el ili malspertaj, mallertaj. Sed la komunsento sur la areno de sporto ĉiel superis tiun dum komunio en la preĝejo. La vera religio de tiuj junuloj estis rugbio. Estis aliaj kia piedpilko kaj kia de la virfeinoj¹ el Melburno, sed tiaj estas neveraj fremdaj religioj. Kaj oni ne deziras herezi.

Dum la finludo, giganta fortikulo kun la pilko alkuregis rekte cele al Lunulo, kaj...uumf...Lunulo haltigis lin ĉirkaŭbrakante la femurojn kaj faligante lin peze teren. Sed, aĉ kia dolorego en la ŝultro de Lunulo. Li stariĝis kaj jes la kruroj ankoraŭ bonstatas sed endis, ke li ripozu. Kuretinte al Ĝimbo la teamestro li informis: “Aĉ Ĝimbo mi devas eksgigi min el la batalo. Mi estas senutila.”

Ĝimbo rekte rigardis lin kaj respondis: “Ne eblas. Vi restos. Ni ne rajtas havi anstataŭulon dum la fina periodo.”

La cetero de la ludo restas kiel nebula memoro por Lunulo. Li ne povis nei la volon de Ĝimbo, la lerneja heroo. Altstatura, brunhaŭta, bukloharara Ĝimbo. Komprenoble la ĥararo komplezis al la volo de la Fratoj. Ĝi estis malpli ol du colojn longa. Kaj Lunulo ne deziris hontiĝi antaŭ sia plej aĝa frato, la iama heroo de la finjara lernantaro de tiu sama lernejo.

En la vespero post la venko la sportemuloj kunvenis por partopreni sian riton de ties “komunia vino”. Drinki bieron. Kvankam leĝe ili ne estis sufiĉe aĝaj, oni rigardis blindokule al tiu peko de la junuloj en la sesdekaj jaroj.

Heroo ne iras al kuracistoj. Anastezila biero pli efikas. Do kiu scias kio okazis al la ŝultro de Lunulo tiutempe. Sed li ja scias, ke la difektiĝoj (ĉu pekoj) de la junaĝo iam revenos. □

¹ Fiinsulto en la aŭstralia vulgara parolaĉo. “Feino” en la angla slango = samseksama. Do “virfeino” = viro samseksama. Melburno estas la origina hejmo de nacie populara ludo “Piedpilko laŭ aŭstraliaj reguloj”, kion rugbiuloj opinias malinda formo de piedpilko, do fiinsultas ĝiajn subtenantojn kaj ludantojn.

RAKONTO POR INFANOJ

LA TEKRUĈOJ DE SUNA ANGULO STRIKAS!

DE TONY PETERSON

Iun tagon, vendisto alvenis en Suna Angulo kaj li havis kelkajn malkutimajn produktojn. Li havis sortimenton de tre malkutimaj tekruĉoj. La tekruĉoj estis tre multkoloraj kaj ĉiuj volis tian tekruĉon tuj kiam ili ekvidis ilin.

Sed io stranga okazis. Kiam ĉiu persono aĉetis tekruĉon, la tekruĉo adoptis la personecon de la posedanto.

SinJORINO Wrinklybottom aĉetis tekruĉon kaj ŝia tekruĉo volis esti “la centro de atento”, same kiel ŝi.

“Simple metu min sur la teleroŝrankon tiel ke ĉiuj vidos min” la tekruĉo diris al ŝi kiam ŝi portis ĝin hejmen.

La tekruĉo de Fraŭlino Prim estis tre elektema!

“Mi ne ŝatas tiun markon de teon kiun vi uzas. Mi havas nur la plej bonajn markojn, alie mi ne elverŝas!”, la tekruĉo parolis per lakona maniero!

Fraŭlino Prim estis ŝokita, sed ŝi faris kion la tekruĉo ordonis kaj tiam ĉio estis bona denove.

La tekruĉo de Freddy Fiddlesticks estis brila kaj multkolora kaj ĉiam feliĉa. Kaj kiom amuze estis kiam Freddy pretigis teon, ĉar la tekruĉo de Freddy ŝatis kanti kiam Freddy ludis sian violonon! Ĉiu kiu trinkis teon ĉe la hejmo de Freddy

ĉiam multege ĝuis la viziton.

La tekruĉo de Konstablo Brown estis serioza, simile al li.

“Ĉu vi ŝatus vian teon nun, Sinjoro?” la tekruĉo ĝentile demandis antaŭ ol elverŝi la teon.

Ĉiuj ŝatis siajn tekruĉojn kaj la tekruĉoj tre ŝatis loĝi en Suna Angulo.

Sed, iun tagon, la tekruĉoj estis ne tre feliĉaj.

Ĉar ĉiu estis tiom feliĉa pro la lertaj tekruĉoj, ili volis pasigi la tutajn tagojn kaj nokton preparante potojn da teo.

Konstante estis “Mi devas meti la akvuĵojn sur la fornon nun” kaj “ĉu vi deziras alian poton da teo?” kaj “ĉu mi rajtas repleniĝi vian tason nun?”. La tutajn tagojn kaj nokton!

Tre baldaŭ la tekruĉoj estis ellaciĝintaj. Ĉi tiu situacio devis ĉesi, do la tekruĉoj ekstrikis!

Ili ĉiuj ĉesis verŝi teon kaj postulis ke io estu farita!

Ili kunvenis kaj amaso de tekruĉoj kungrupiĝis apud Ponto Koboldo.

Tiam unu el ili ekparolis:

“Ni neniam povas ripozi eĉ momenton” diris la tepoto de S-ino Wrinklybot-

A STORY FOR CHILDREN

THE SUNNY CORNER TEAPOT STRIKE!

BY TONY PETERSON

One day a salesman came to Sunny Corner and he had some very unusual products. He had an assortment of very unusual tea pots. The tea pots were very colourful and everyone wanted one as soon as they set eyes on them.

But a strange thing happened. As each person bought one of the pots, the pot took on the personality of its owner.

Mrs. Wrinklybottom bought one and her tea pot liked to be the centre of attention, just like she did.

“Just put me on the sideboard so everyone will notice me!” the tea pot said to her when she brought it home.

Miss Prim’s tea pot was very fussy.

“I don’t like that brand of tea you’ve been using. I only have the best brands or else I don’t pour out!”, the tea pot snapped.

Miss Prim was taken aback by this but did as the tea pot commanded and then everything was all right again.

Freddy Fiddlesticks’ tea pot was bright and colourful and always happy. And what fun it was when Freddy made tea, because Freddy’s tea pot liked to sing along whenever Freddy played that fiddle of his! Everyone who had tea at Freddy’s

place always had a great time.

Constable Brown’s tea pot was serious like him.

“Would you like your tea now, Sir?” the tea pot would ask politely before pouring out.

Everyone seemed to like their tea pots and the tea pots liked living in Sunny Corner.

But, one day, the tea pots weren’t so happy.

Because everyone was so happy to have these clever tea pots, they wanted to spend all day and night making pots of tea.

It was “I must put the kettle on now” and “Would you like another pot of tea?” and “Can I refill your cup now?”. All day and all night!

Pretty soon, the tea pots were exhausted. Something had to be done about it, so the tea pots went on strike!

They all stopped pouring tea and demanded that something be done!

They had a meeting and dozens of tea pots gathered together near Pixie Bridge.

Then one of them spoke up.

“We never get a moment’s rest” Mrs. Wrinklybottom’s tea pot said. “Every five

tom, “Ĉiun kvinan minuton estas tempo por taso da teo. Mi estas tute ellaciĝinta! Mi bezonos novan elverŝtubon kaj mia bela potkovrilo estas tre ĉifita!”

La aliaj tekruĉoj konsentis ke ne plu teo verŝiĝos antaŭ ol al la tekruĉoj estos donitaj pli bonaj laborkondiĉoj.

“Ni devos havi libertagon foje kaj refoje,” unu el ili diris.

Alia aldonis: “Mi vere ne ŝatas iun ajn el la markoj de teo kiujn Fraŭlino Prim uzas!”

Kaj ankoraŭ alia diris: “Neniom pli da teo verŝiĝos ekde hodiaŭ, knabinoj. Ni strikas!”

La tekruĉoj marŝis de la ponto kaj tra la ĉefa strato de Suna Angulo. Kia spektaklo ili estis!! La diversaj tekruĉoj de diversaj grandoj kaj formoj kaj koloroj, saltantaj laŭ la strato!

La kovriloj de kelkaj klakadis kaj vaporo eĉ venis el la elverŝtuboj de kelkaj!

Kaj kvankam la vetero estis malvarma, kelkaj tekruĉoj eĉ rifuzis surporti siajn potkovrilojn!

“Eble min atakos gripo, sed ne gravos tio!” unu el la tekruĉoj diris dum ŝi defiis la malvarman okcidentan venton.

La popolo de Suna Angulo ne sciis kion fari! Ili amis havi tason da teo kaj ĝi estus malfeliĉa loko se ili ne plu povos trinki teon.

Matilda, la Praonklino de Fraŭlino Proper estis preskaŭ frenezeta kaj diris: “Gladys! Mi eĉ ne povas ĝuste komenci

la tagon se mi ne havas tason da teo! Faru ion! Donu al la tekruĉoj kion ajn ili deziras!”

Fraŭlino Proper konsentis kaj vokis la ĉefurbestron por trovi ĉu li povos solvi la problemon. Ŝi eĉ konsideris voki Elroy-n, la Nekapteblan Elfon por helpi ilin, sed li estis ĉiam faranta ruzojn kaj tial li ne estis tre fidinda.

Kion povas ili fari?

Tiam juna Timmy Taylor havis fulmo-cerbideon.

“Kiel vi nomas vian tekruĉon, Sinjorino Wrinklybottom?” Timmy diris.

“Mi ne nomas mian tekruĉon!” ŝi diris.

“Eble jen la problemo! Eble se ni donus al ĉiu el ili nomon ili sentus sin pli gravaj kaj specialaj!” Timmy diris.

La ĉefurbestro demandis al la tekruĉoj ĉu tio estos en ordo por ili.

“Tio ekzakte estas kion ni deziras. Iom da respekto. Kia lerta juna knabo vi estas Timmy Taylor! Fine, iu kiu komprenas!” la tekruĉo de Sinjorino Wrinklybottom diris.

Sinjorino Wrinklybottom diris: “Nu, kiel vi nomiĝas?”

La tekruĉo klakis sian kovrilon kaj diris: “Efektive, mia nomo estas Geraldine, se vi ne protestas!”

Sinjorino Wrinklybottom diris: “Mi neniam sciis tion!”

“Kaj vi neniam pensis demandi!” Geraldine klakis.

minutes it's time for a cup of tea. I'm worn out! I'm going to need a new spout and my beautiful tea cosy is all rumpled and misshapen!”

The other pots agreed that there would be no more tea poured until they were given better conditions.

“We have to have a day off now and then,” one of them said.

Another chimed in with: “I really don't like any of the brands of tea that Miss Prim uses!”

And still another said: “No more tea poured from today, girls. We're on strike!”

The tea pots marched off the bridge and down the Sunny Corner Main Street. What a sight they were! All those different tea pots of all sizes and shapes and colours, bouncing up and down the street!

Some had their lids flapping up and down and some even had steam coming out of their spouts!

And even though the weather was a bit cool, some tea pots even refused to wear their tea cosies!

”I'll probably get the flu, but it'll be worth it!” one of the tea pots said as she braved the cold westerly wind.

The people of Sunny Corner didn't know what to do! They loved having a cup of tea and it would be a very sad place if they couldn't have any more.

Miss Proper's Great Aunt Matilda was beside herself and said: “Gladys! I can't even start the day properly if I don't

have a cup of tea! You'll have to do something! Give the tea pots whatever they want!”

Miss Proper agreed and called the Lord Mayor to try and solve the problem, but he wasn't much use. She even considered calling on Elroy, the Elusive Elf to help them, but he was always playing tricks and so he wasn't too reliable.

What were they to do?

Then young Timmy Taylor had a brainwave.

“What do you call your tea pot, Mrs. Wrinklybottom?” Timmy asked.

“I don't call my tea pot anything!” she said.

“Perhaps that's the problem! Maybe if we gave them each a name they would feel more important and special!” Timmy said.

The Lord Mayor asked the tea pots if that was okay with them.

“That's exactly what we want. A bit of respect. What a clever little boy you are Timmy Taylor! At last, someone who understands!” Mrs. Wrinklybottom's tea pot said.

Mrs. Wrinklybottom said: “Now what shall I call you?”

The tea pot flapped its lid and said: ”Actually, my name is Geraldine, if you don't mind!”

Mrs. Wrinklybottom said: “I didn't know that!”

“And you never bothered to ask, either, I might add!” Geraldine snapped.

Fraŭlino Prim estis nomonta sian tekrucŝan, kiam la tekrucŝo giris kaj diris: “Kaj antaŭ ol vi demandos, mia nomo estas Tessie Tea-Leaf! Tea-Leafs preparas teon jam de jarcentoj!”

Fraŭlino Prim estis tre ĝoja pri la nomo. “Tessie ja estas tre bela nomo por tekrucŝo!”

La kovrilo de la Tessie Tea-Leaf giris rapide pro la komplimento.

Subite, ĉiuj estis ekscititaj kiam ili eltrovis la nomojn de siaj tekrucŝoj.

Freddy Fiddlesticks eltrovis ke lia tekrucŝo nomiĝis Polly.

“Nun mi povos diri ‘Polly varmigu la akvuĵojn’ kiam ajn mi deziras trinki teon!”¹ Freddy diris al Sinjorino Wrinklybottom, kiu volis ke ŝia akvuĵo havu tiun nomon.

Ĝuste tiam, Tessie Tea-Leaf giris kaj diris: “Venu nun, knabinoj! Ni iru prepari pli da teo!”

Ĉiuj jubilis kiam la tekrucŝoj marŝis tra la strato denove, irante hejmen por fari bongustajn potojn da teo! Kaj ĉiuj hastis post la tekrucŝoj, avide.

Suna Angulo fine havis feliĉajn tekrucŝojn, ne kolerajn, kaj ĉiuj povas antaŭĝui havi bonan tason da teo de nun.

Kondiĉe ke ili nomis siajn tekrucŝojn per iliaj ĝustaj nomoj, ĉu ne? □

Miss Prim was about to name her tea pot, when the tea pot spun around and said: “And before you ask, my name is Tessie Tea-Leaf! Tea-Leafs have been making tea for hundreds of years!”

Miss Prim was delighted with the name. “Tessie’s such a beautiful name for a tea pot too!”

Tessie Tea-Leaf’s lid spun quickly at the compliment.

Suddenly, everyone was excited as they found out their tea pot’s name.

Freddy Fiddlesticks found out that his tea pot was named Polly.

“Now I’ll be able to say ‘Polly put the kettle on’ whenever I want to have tea!” Freddy said to Mrs. Wrinklybottom, who wished her tea pot had that name.

Just then, Tessie Tea-Leaf spun around and said: “Come on, girls! Let’s get back to making more tea!”

Everyone rejoiced as the tea pots bounced down the street again, heading off home to make delicious pots of tea! And everyone hurried behind the tea pots, eagerly.

Sunny Corner finally had happy tea pots, not angry ones, and everyone could look forward to having a decent cup of tea from now on.

As long as they called their tea pots by their proper names, of course! □

Aliaj porinfanaj rakontoj pri Suna Angulo aperos fojfoje en estontaj numeroj de EJK

¹ Populara infankanto anglalingva tekstas: “Polly, varmigu la akvuĵojn, kaj ni ĉiuj trinkos teon”.

UNUAJ TRAVIVAĴOJ EN JAPANUJO

DE JENNIFER BISHOP

Estas vintro en Japanujo, sed miaj unuaj impresoj estas de tre varma kaj helpema popolo, eble pro miaj lambastonoj, kvankam mi dubas tion.

Renkontite ĉe la moderna flughaveno de Hiroshima de Alan, mia edzo, kun du liaj studentoj, per aŭto mi rapide atingis nian novan hejmon, apartamenton en kvaretaĝa konstruaĵo. Ĝi enhavas salonon/manĝejon/kuirejon kune, dormoĉambro kun moviĝantaj plastaj muroj je du flankoj, tatamimatoj sur la planko, vestoŝranko kaj granda enmura ŝranko por teni dumtage la litojn (futono), kovrilojn kaj kusenojn.

En la koridoro troviĝas ban/lavejĉambro kun pelvo, duŝo kaj malgranda bankuvo, aparta necesejo kaj du kromaj ĉambroj. Certe ni sentas nin dorlotitaj komparante la grandecon kun la apartamento de universitata profesoro kun edzino, filo 10jara kaj filino 12jara.

Unue mi rapidis al la balkono por ĝui la vidaĵon suden super plejparte grizkolora loĝokvartalo al arbarkovrita montetaro. Poste, interne ekscitis min, akvoŝparemulon el Melburno, la tre efika aranĝo ĉe la necesejo. Anstataŭ provizi apartan lavpelson, post akvumi oni lavas la manojn super la akvujo kie akvo fluas el krano en pelveton kun truo por flui rekte en la akvujo — eĉ bonega reuzo de akvo por akvumi! Bonŝance mia edzo jam al kutimiĝis al la lavaŝino post ricevi tradukitajn instrukciojn el la japana, do mi devos kuti-

miĝi nur al dormado sur futono kaj kuirado sen kutima forno.

La nova vivo komenciĝis ne tre facile pro manko de la japana lingvo sed pro bonkoraj angleparolantaj kolegoj kaj esperantistoj mi tute ne antaŭvidas tro da nevenkeblaj problemoj.

La japanoj certe scias festi. Jam dufoje en la unua semajno ni partoprenis je popolfesto — festo de sojfaboj la trian de februaro ĉe la familio de kolego, kaj festo de ostroj la 6an de februaro ĉe la marbordo kun esperantistoj.

Ĵaŭdon la trian alveninte ĉe la familio, laŭ la japana kutimo ni lasis niajn ŝuojn ĉe la enirejo. Jam preta sur la manĝotablo kuŝis bovlo da sekigitaj faboj kaj ĉe ĉiu sidloko telereto kun sardino kaj telero kun nigra kolbasaspekta manĝaĵo — rizo kun spicitaj legomoj volvitaj en marherbaĵo. Kiamaniere manĝi ilin? Laŭ la festa kutimo oni ĵetas la fabojn en la aeron por bonvenigi la novan sezonon de burĝonado, sed kompreneble ne en la eta domo. Sekvante niajn gastigantojn ni manĝis la fabojn kaj kolbasaĵon per fingroj kaj la sardinon malfacile per bastonetoj. Ni tre ĝuis festi ĉe la familio ne nur la komencon de nova sezono sed ankaŭ la finon de la lerneja jaro.

Dimanĉon la 6an je 08.30 Ges-oj Osioka kolektis nin de antaŭ la stacidomo; S-ro Moritaka Osioka, UEA-delegito kaj antaŭa Sekretario de JEA, kun sia edzino

Taeko Osioka, bone konata pro sia laboro por paco kaj Internacia Virina Tago. Rapiĉe ni veturis por atingi Ondon antaŭ 10.30. Laŭ valoj, preterpasante vicon de vilaĝoj kun ĉarmaj malnovaj domoj kaj aliaj el betono, veturante tra tuneloj kaj super riveroj, ni atingis la konatan havenon Kure kie dum la dua mondmilito konstruatis la fama mararmea ŝipo Yamato. Ĉe la alia flanko de granda ponto 25m alta ni alvenis ĝustatempe por alkroĉiĝi al vico por ricevi bakitan ostron kaj poste glason da sakeo. Niaj gastigantoj plurfoje realkroĉiĝis al la vico por havigi por ni pliajn marofruktaĵojn, ĉiuj bakitaj por eviti problemon en la stomako. Mi konfesas ke mi iomete timis vidante la evidentan polucion kaŭzitan de la haveno kaj la multaj urbetoj je la piedo de ĉiu montetinsulo de la interna maro. Tamen ni multe ĝuis la etoson de la popola evento, organizita de la fiŝistoj mem sen ia komercaĵo.

La gejunuloj aranĝis multekolorajn flagojn, podion kun Karaoko-kantado por la junaj kaj maljunaj virinoj kaj viroj kiuj ŝatas kanti la tradiciajn kantojn. Entute viciĝis 30 personoj por distri nin. Je tagmezo, post dancanta vico de maskitaj gejunuloj enkondukantaj la novan ostrosezaron, ĉio finiĝis inkluzive de la sakeo-fluo.

Ges-oj Osiako bonkore decidis ekskursi ĉirkaŭ la insulo kaj ĉirkaŭ dua insulo kie loĝis parencoj en kies ĝardeno eblis rikolti oranĝojn kaj grapfruktojn. Tiujn ni manĝis ĉe la marbordo antaŭ bela restoracio sed bedaŭrinde la ĉirkaŭa promenejo kaj naĝejo detruatis per tajfuno dum la pasinta jaro. Ni esperu ke oni sukcesos ripari ĉion antaŭ la komenco de la sekva feria sezono. Estis tre impresplena kaj ege ĝuinda tago kaj ni nun antaŭĝuas

viziton al la domo de Ges-oj Osioka por renkonti pli da esperantistoj de Hiroŝimo. Antaŭ tio ni vojaĝos al la insulo Ŝikoku kaj refoje kunmetos fakprelegon en Matsujama kun vizito al esperantista amikino Tomoko Yoshinaga en Tokushima City. Ni renkontis ŝin unuafoje ĉe aŭstralia somerkursaro en Adelaide. Eble vi mem konas ŝin? Ni ĉiuj sendos al vi niajn plej amikajn salutojn. □

KOREKTOJ

- En nia januaro-februara numero ni mispresis la retadreson de la esperantaj disendoj de radio 3zzz. La ĝusta adreso estas www/3zzz.com.au/.
- Henry Broadbent atentigis nin ke la mencio de li kiel meritanta esti premiĝinta en la konkurso estas erara. La laboro farita estis komuna produkto de la melburna grupo de Esperanto-lernantoj, kun helpo de Franciska Toubale.

ALVOKO

Kiel la plejmulto el vi scias, Ray Ross verkis (kaj AEA eldonis) tre utilan Historion de Esperanto en Aŭstralio ĝis la jaro 1985. Nun Terry Manley verkas similan Historion por la periodo 1986-nun.

Ni petas tiujn el vi, kiuj posedas la proveldonon de la libro de Terry, traserĉi ĝian enhavon por trovi nemenciitajn faktojn enmetindajn. Ankaŭ, ni petas tiujn el vi kiuj posedas ekzempleron de la libro de Ray Ross, tralegi ĝin por trovi korektindaĵojn aŭ informojn aldonindajn, ĉar Terry planas aldoni al sia verko malgrandan ĉapitron pri korektoj/alдонаĵoj al la verko de Ray Ross. Adreso de Terry Manley: 50 Alagalah St, Narromine NSW 2821. □



• deziras korespondi

Mi estas Ellizabeth Miller, kaj mi havas 59 jarojn. Mia esperanta nomo estas Elinjo. Mi deziras havi plumamikinojn en via lando. Mi laboras kiel sekretariino sed en du jaroj mi retiriĝos. Mi ne havas gefratojn, kaj miaj gepartroj estas mortintaj. Mi havas nek edzon nek gefilojn. Mi estas kristano; ekskatolika, sed nun iras al la eklezio “Unity”.

Mi havas multajn interesojn; legi librojn de poezio kaj nefikcio; aŭskulti muzikon; la

Biblio kaj monda religio; la pacmovado; la kulturoj de Azio, speciale de Japanio, Ĉinio kaj Koreo; lerni fremdajn lingvojn kaj korespondado.

Mi estas membro de la Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko kaj mi havas esperantajn plumamikinojn en Hanojo, Vietnamo, Parizo kaj Brazilo. Mi esperas ke mi havos amikinojn en Aŭstralio. Samideane,

Elizabeth Miller (“Elinjo”); Apt. 1R, 415 Argyle Rd., Brooklyn NY 11218-5427, Usono.

LA ROZKOLERA AŬRORO

ŜERCA RAKONTO DE VERA PAYNE

PREMIITA EN LA “NEFACILA KONKURSO 2004”

La rozkolera aŭroro minacis. Pli da malbona vetero ĝi prognozis. Mi fortunis min kaj reeniris mian vespertokavernon. Mi sentis min deprimita. Kaj tiam, tute ne atendite, frapetis min mola, karesema bateto. Ĝi venis de la korskue bela virvesperto, Mistero Darsio. Eta, malgrava mi, Elizabeta Bato, magnetiziĝis, kiam mi aŭdis lian profundan voĉon elbuŝigi la urĝajn vortojn, “Vin amas mi.” “Vin ne adori ne povas mi,” li aldonis. Lia parolo estis kurba kaj konvinka. Miaj vespertaj genuoj tremis. Mi rigardis lin sopire.

Frap! Hororo! Frapegis mian vizaĝon peza, tute ne karesema batego. Kontraŭ mi, flugilo sur kokso, furioze rigardis min eleganta, tre indigna vespertino, verŝajne la jama amatino de mia Mistero.

Poŝ Tino (tio estis ŝia nomo), insistis, ke S-ro Darsio agnosku, ke, nur la antaŭan tagon, lin ege ĝojigis ŝia salato per kiu ŝi tenis lin sur la strato. Li ne povis nei la

akuzon, kaj mia koro krevis kiam mi konstatis, ke mia usa amanto verŝajne ne estas fidinda.

Kvazaŭ por substreki mian opinion, aperis tria, svelta vespertino, kaj, kredu ne kredu, kvara, tiu ja malavare dotita. La du komencis senhonte okulumi Misteron, langopuŝe insulti Poŝon kaj min, flugilumi unu la alian, ĝis ili interligiĝis kaj komencis interuladi laŭ la kaverno. Interuladaj pretendigis venis kriege el la buŝoj de la du. “Rigardu min! Ĉu mi ne ruladas mirinde bele?” kriis unu (Mirinda). “Vidu min! Mi ruladas olimpiko bone!” fanfaronis Olimpia.

Mia kompatinda (kvankam nefidela) Darsio metis siajn flugilojn al la kapo kaj forte skuis ĝin. Estis por li tro da bruo, tro da pretendo, tro da usaj amatinoj. Ho ve. Kapdoloro. Dolorogo. Kion fari? Trafa ideo — elspezi la dolorojn! Li do komen-

cis: unu, du, dek, dek naŭ, naŭdek nau, cent! Jen la lasta. Sed, elspezinte lastan doloron sian, li ĉagreniĝis, ĉar ankoraŭ Mirinda kaj Olimpia ruladis (eĉ hontige malmodeste, se vi povas imagi) kaj brudis tre moleste. Ili neŝanceble celis de logi mian (Poŝan?) Darsion perrulade se ne per-salate.

Ankoraŭfoje Mistero skuis la belan kapon, tiam liberigis ĝin de siaj flugiloj. Lia granda liberkap' (ho diablo) estis mirinda por la kunlaborantoj — nun eksaj konkurantoj. Jes, finfine ili pretis dividi inter si la ĉarmojn de la dezirata batviro, kaj komencis mioldolĉe dorloti, rideti, karesi, murmuri amore. Mi naŭziĝis kaj forflugis el la kaverno. Poŝ batalu kontraŭ ili se ŝi volas. Mi seniluziĝis pri la amo en tiu angulo.

Estis vendredo, do, bazartago. Sed kompreneble ankaŭ tie la paco eskapis min. Mi surmuriĝis apud amaso da bubo-pupoj vendotaj; bubo-pupoj klakantaj kaj bruantaj. Oj ve. Ili bategis, mordis, hurlis, penis murdi unu la alian. Unu jam falis sur la grundo, kun kapo frakasita. Ĉi tiu bazara bubo bezonis riparon — vere, mankis rip-aro! Neniu rimarkis tion. La teda, bizara bruo daŭris. Sed la vendisto de la pupo kiu forpuŝis la falintan, frakasitan bubupon hurlis fierege. “La venko!” ŝi pretende kriegaciis. Jes, fiere spiris ŝia bruto, pro la brut(alec)o de la venkinto. Ŝia konkuranto en la vendado tute ne sin ĝenis. Ŝi sciis, ke tia bagatelo ne gravas en la granda aventuro de la vivo. Do, ŝi trankvile rastis karoton falintan sur la grundo por raspi en la oranĝruĝan barĉon kiun ŝi portagmanĝe estis pretiganta.

Ho mia kor'. Mi volis foriri de tiu koŝmara etoso. Mi turnis min al la estro de la bazaro kaj petis lian helpon tran-

kviligi la ĥaason. Sed li opiniis, ke la bruo ne malhelpas la komercon. Male, li deklaris, li tre ŝatas stimuli ion kio allogos pli da uloj al lia bazaro. Ĉirkaŭ li amasiĝis aliaj, kapjesante akordiĝe kun li. Li komencis imiti iniciatojn, kiuj estus, laŭ li, albazare tirigaj. La aliaj similis pli da allogaĵoj, kaj sekve la estro volonte similis ĉiun ajnan bonan iniciaton de la kunlaborantoj.

Kompreneble, mi fuĝis. Mi volis perdi min en io tute nebrua, nekonkursa. Mi sidis sur parkobenkon, kie kuŝis iu libro. Libro kun simplaj kaj apelitaj literoj. Bone. Estis libro por infanoj. Sed la bildoj! Tiuj vidigis disŝiron de korpoj. Temis pri sangofluanta batalo inter usaj prezidentoj de Pacolando (US Prezidento Gobo kaj US-Prezidento Joko). Imagu — porinfana libro kun tiaj groteskaj desegnaĵoj! Nu, en gladiatora interbatalo oni atendas sangon, sed en Pacolando sango de la prezidento ne devas okazi en porinfana libro. Mi forĵetis ĝin kolere. Bonk! Ho mia Di'! Aperis kara Darsio, frotetante la ŝvelaĵon sur la kapo kie la duoble ofenda libro lin trafis.

Mi balbutis, pardonpetante, sed li ape-naŭ aŭskultis. Li mem nekohere murmuris ion pri Poŝ Tin', lia verŝajne preferata kunulino. Li ofte deliris ŝin vidi, li konfesis. Li havis kutimon esprimi sin per longaj, multvortaj, bizaraj prepozicioj, al ŝi, kiaj ekzemple, ekalĝisde! kaj, malantaŭsuren! La amo faris el li idioton. Sed la karulino, Poŝ, komprenis kaj kompatis lin. Ŝi vere amis lin. Ŝi kaj li volis malaperi en la krepuskon, brakenbrake. Ili ne volis esti en la spotlumo. Ilin ege timigis neatendita blagotagoagoklago. Poŝ klarigis, ke Mistero reiros labori por filio de eta firmao kiun li antaŭ kelka tempo estis forlasinta. Lia eta filio estis trista, ŝi diris,

kaj sen ia dubo bonvenigos lin refoje en sian sinon. Bonŝance, la firmao lokiĝas centojn da kilometroj for. Mi elspiris sopire. Ho ve. Mia bela Darsio malaperos el mia vivo, verŝajne porĉiame. Larmeto elfluis el mia okulo.

Apud mia benko, ĝardenogomo ankaŭ larmis. La gazono-razisto forrabis lian barbon kaj pro lia nuda vizaĝo la etulo tristis. Mi drolotis lin empatie. Mi komprenis kio estas, perdi ion kortiran. Mi turnis min Mister-direkten kaj adiaŭis mian adoratulon, Darsion. Li montris iom

da honto, bone sciante, ke li ja estis kuraĝiginta min enamiĝi al li, kvankam li jam havas amorantinon kiu ankaŭ amas lin. “Er er er er...” li balbutis. Ankaŭ Poŝ diris, iom senpove, “...er er er er...” Sed mi komprenis, ke ili apartenas unu al la alia. Ili sukcese provis ĉiujn “er”-arojn kaj mi ne povis ne vidi la v-er-on. Bonŝancon al tiuj du; iliaj ve-spertoj estu maloftaj, kaj iliaj etuloj multaj. Kaj mi atendu alian vesperto-ĉarmulon. Mi jam aŭdis pri iu rave atleta, forta, fama Batmano... □

☝ • LAŬ MIA VIDPUNKTO LA ĈEFAJ OBSTAKLOJ DE PROGRESO

DE JOHANO PETIK

En mia lasta artikolo (*ĈK* 73, pĝ.16) mi vortumis kelkajn tiajn opiniojn pri nia movado, kiuj, konsidere la originajn, laŭstatutajn destinojn de Akademio de Esperanto [AdE] kaj la tutaĵo de la movado rigardeblas falsaj, kaj aliflanke — pruvendaj. Ĉi-poste mi provos prui ilin.

Mi komencas per tio, ke jam nur kategorie deklari nian *Fundamenton* absolute netuŝebla estas ago pli konvena al Santa Sede en Vatikano, ol al komunumo kun la celo atingi ion sekularan, aldone armite ne de dogmoj, kredo, sed de atingaĵoj en scienco (lingvistiko). Jen kelkaj argumentoj kontestigantaj ĉi tiun kategorian rilatiĝon.

Ni rigardu la esencan elementon de la *Fundamento*: la Zamenhofan 16-punktan “Plenan Gramatikon”. Ĝi eventuale, teorie rigardeblas tiam absolute netuŝebla, se ĝi ne prezentus kontrŭdiron, kompletigendaĵon, do se ĝi fidele spegulus la lingvan realaĵon. Sed ĝi ne fidele spegulas ĝin — mi diras, kial.

La 1-a punkto de ĉi tiu “sanktaĵo” simple malpermesas la uzon de nedifina artikolo en esperanto, dum ĉi tiu ofte renkonteblas en ceteraj partoj de nia Sankta Libro (en la formo de “unu”) kaj (kio estas pli grava) en niaj modernaj verkoj, tekstoj (en la formo de “iu”). Por neniiĝi ĉi tiun kontraŭdiron kaj por anstataŭigi la enkontra-banditajn “unu”, “iu” (precipe pro ilia maltaŭgeco) mi provadis proponi la vorton “un” ĉi-cele, sed la skribitaj formoj de la propono aŭ malaperis en la arkivejo (aŭ rubaĵujo...) de la adresuloj, aŭ provokis pretekstojn por povi rifuzi ĝin.

Jen la afero de la 10-a punkto (pri la vortakcento en esperanto). La regulo prezentis jam tempe de Zamenhof escepton (temas pri la vortfinaĵo “-aŭ”) kaj konsidere la tiaman staton de lingvistiko (aŭ la gradon de iniciteco de Zamenhof en ĉi ties atingiĝoj), tio estas ne mirinda, ke la rondon de diftongoj en Esperanto Zamenhof determinis ĉi tiel malvasta. En la pasinta jarcento la atento de lingvistoj pli intense dediĉiĝis

al la aperaĵo diftongo, sekve de kio hodiaŭ oni rigardas ankaŭ la finaĵojn “-io”, “-ia”, “-ie” kiel diftongojn, el kio jam gvidas vojo rekta al la konkludo, ke ankaŭ la vortoj kun ĉi tiuj vortfinaĵoj devus esti akcentitaj simile al la vortoj kun “-aŭ”. La parolo ĉikaze estas ne nur pri la ĝisdatigo de nia gramatiko, sed ankaŭ pri la forigo de makulo prezentita de la esperanta parolo (prononco) de ĉi tiaj vortoj, da kiuj estas pli ol 600 (se paroli nur pri ĉi tiuj vortoj). Finaŭskulturo nur unufoje esperanto-lingvan radiodisaŭdigon kaj vi spertos, kiel monotona estas la parolado pro la akcentmaniero de ĉi tiuj (“nacia”, “situacio”, “energie” k.s.) vortoj. La lanĉado de ĉi tiu problemo tamen pleje renkontas rifuzon, maksimume nur “hm”-adon.¹

La vico de problemoj estus daŭrigebla. La pli interesa tamen estas la maniero kiel AdE rilatiĝas al la lanĉaĵoj pri ĉi tiaj aferoj. Konceptante la lingvojn, do ankaŭ esperanton ne kiel sanktaĵon, sed kiel produkton de kulturo, kio apriorie prezentas la eblecon, eĉ nemalhaveblecon de evoluigo, oni povas fari eĉ krimon i.a. kontraŭ nia esperanto konscie, intence malhelpante ĝian evoluon. Ĉar nia AdE konsekvence rifuzas la petojn nur publike trakti lingvajn problemojn de esperanto, ĝi faras (laŭ mi) ĝuste ĉi tiun krimon. Oni tie ne emas akcepti, ke esperanto ne nur kreiĝis, sed ankaŭ evoluas alimaniere ol etnaj lingvoj, kaj ke ĝi kelkakaze bezonas ĝisdatigojn ne nur leksikologiajn, sed ankaŭ gramatikajn (kiu, sen konscia kaj intenca interveno samtiel ne okazas, kiel la leksikologia!). (Per tio ĉi mi tamen ne volas absolute demonigi la agadon de AdE, des pli, ĉar ankaŭ mi ŝuldas multon al ĝi pro la helpoj

donitaj ankaŭ al mi en la ĝusta interpreto de kelkaj lingvaj aperaĵoj.) Pretekstante, ke esperanto evoluigeblas ekskluzive per prezento, resp. ĝenerala akcepto/imitado de novaj lingvaj aperaĵoj en libroj, gazetoj kun modela lingvaĵo, AdE tiel esence mahelpas la evoluon de esperanto kaj trompe ŝajnigas esperanton kiel lingvon nur skribe uzatan kaj evoluigeblan.

La evolumalhelpon la tutaĵo de nia movado samtempe realigas malebligante la aperon de skribitaj materialoj pri novaj strategiaj konceptoj aŭ indiferente turnante la dorson al ĉi tiaj proponoj ĝenerale. La sorto de esperanto pli dependas de nia agado ol ĝis nun supozite, en esperantujo tiu ĉi ideo tamen deove, ial surrifiĝas. La kaŭzon de ĉi tio mi povas nur konjekti: la parolo estas eble pri tio, ke por la plimulto de esperantistoj nia lingvo estas fakte ne (un) age, efemere apogenda objekto, sed io anstataŭanta la Dion de religianoj, do kultaĵo, per kies kultado “esperanto-religianoj” povas satigi sian pretendon ŝajni homo bona, nobla en la okuloj de la ĉirkaŭanta homa medio. Mi eble ne eraras ankaŭ supozante ke la plej koncizan klarigon liverus la konsidero ke UEA estas organizaĵo (ideologie kaj laŭ klasa aparteno) burĝa, do idealisma, iom religieca.

Dum ni ne ŝanĝos ĉi tiujn malfavorajn faktojn de nia esperantisteco, ia ajn perceptebla progreso por nia afero estos apenaŭ atingebla. □

[La distanco inter idealo kaj realo estas tiom granda, ke ofte ili ŝajnas tute ne intersimili. —
[aŭ]

¹ Atentigo al la legantoj: kiam oni aŭskultas parolatan esperanton, ekzemple per la radio, oni preskaŭ ĉiam aŭdas onin prononci “rādĵo” “nácĵa” kc. anstataŭ “radio”, “nacio” (la “i” indikas la akcentitan vokalon). Zamenhof rekonis ke oj, aj, ej, uj estas diftongoj, sed ne konsideris jo, ja, je, ju diftongoj. Tamen preskaŭ senescepte, almenaŭ en la eŭropaj lingvoj — inkluzive de la angla — ili estas sentataj kiel diftongoj, kaj tial esperantistoj — ne nur tre granda parto de ordinaraĵ sed ankaŭ eĉ tre bonprononcaj esperantistoj — kia Ivo Lapenna — akcentas la vokalon antaŭ la -i-. — [aŭ]


UNUJARA KAJ ELŜUTEBLA

Antaŭ iom pli ol unu jaro estis malfermita por la publiko la nova reta *Katalogo de UEA*: <http://katalogo.uea.org>. Dum la jaro pere de ĝi estis faritaj centoj da mendoj por dekmiloj da eŭroj. Kiel donaceto por la jubileo la *Katalogo* ekhavis elŝuteblan version. Tiu estas en la formato HTML, kaj eksperimente — CHM (Vindoza helpo). La rekta adreso estas <http://katalogo.uea.org?st=elshuto>.

Por la individuaj membroj de UEA estas lanĉita nova reta servo: aliro al la aktualaj informoj pri la Delegita Reto kaj al aliaj movadaj informoj per Interreto.

La sistemo ĉerpas la informojn rekte el la komputiloj de la Centra Oficejo kaj prezentas ilin en la maniero simila al la papera eldono, sed samtempe kun oportunaĵoj kutimaj por la retuzantoj: serĉiloj, hiperligoj, retroŝto k.s.

La reta Jarlibro estas atingebla per la adreso <http://reto.uea.org>. Eniri ĝin rajtas ajna individua membro de UEA. La sola limigo estas, ke la membroj kun *Gvidlibro* vidas nur la movadajn informojn.



RADIO 3ZZZ

Nia aŭstralia Esperanto radio-programo

Ĉiam aŭdebla per Interreto

Kvankam la nombro da esperantlingvaj radioprogramoj aŭskulteblaj per Interreto ebligas informiĝi pri la vidpunktoj kaj opinioj de personoj en multaj landoj — kaj ankaŭ aŭskulti (vole/nevole) la politikajn asertojn de iuj landoj — ne scias ĉiuj esperantistoj ke nia propra aŭstralia esperantolingva radioprogramo unuhora aŭskultebblas ĉiam ajn dum la semajno, ĉe www.3zzz.com.au. La vario de la enhavo — muziko, prelegoj, komentoj, intervjuoj, kulturaĵoj — faras ĝin interesa por ĉiuj aŭskultantoj. Kaj la lingvonivelo estas alta. Ĉiu komputilo konektita al Interreto kapablas aŭskultigi la programon, kiu estas nova ĉiusemajne. Simpla modemo sufiĉas — ne necesas “broadband” — kaj la senpaga komputilprogramo RealPlayer (elŝutebla ĉe www.real.com).

Krozante la mondon, ne forgesu vian propran ĉehejman esperantolandeton!



• skribas la legantoj

SKRIBIS PAUL DESAILLY:

Mi petas vin sciigi pri la ĉi suba propono de samideano Johan Kohler el Durbano kaj pri mia respondo donace provizi bonkvalitajn esperanto-librojn, inkluzive de ekzempleroj de *ESK*, ĉar en tiu kazo eble vi konas mecenaton (au fonduson) kiu pretas pagi la sendo-koston de Kantono al Afriko; malpli ol dek kilogramojn koston proksimume 33 eŭrojn. Se vi povos pozitive reagi bonvolu transĝiri la monsumon al mia UEA-konto (pdsy-o). Fakte la iniciato kaj propono de sinjoro Kohler eble ne plu vere validas rilate al Durbano sed venis en mian menson rezulte de lia aktiveco, kaj pro tio ke mi jam preparis la pak-aĵon, plano ekspedi esperanto-librojn aliloke en Afriko; eble pri tio aŭ pri alia ir-celo vi povos rekomendi.

Kara Johan:

Leginte pri esperanto-iniciato en kiu vi ĉefrolis (Internacia Semajno de Amikeco) en Durbano, ĝemela urbo de Kantono de Ĉinio kie mia edzino kaj mi instruas la anglan kaj kiel eble plej ofte la Internacian Lingvon, mi intencis disponigi al vi plurajn bonkvalitajn librojn, magazinojn ktp sed ĝuste tiam je la mezo kaj je la fino de februaro kiam vi okazigis vian eventon mi serĉis novan postenon kaj novan apartamenton en la urbocentro de Guangzhou. Mi ankoraŭ pretas ekspedi la sekvajn titolojn por ke viaj junaj esperantistaj geamikoj ĝuu altnivelajn eldonaĵojn sed bedaŭr-

inde mi ne toleras la elspezon de internacia afranko; relative alta monsumo mia opinie. Eble fonduso pri kiu vi povos enketi ekzistas por helpi tiurilate.

- 1 *Kroata Milita Noktlibro* de Spomenka Štimec.
- 2 *Liberigo* de Karl May (Dulingva bindita eldono de *Eine Befreiung*)
- 3 *La Nova Realismo* de Bruno Vogelmann.
- 4 *Verkoj de Verda Majo* de Hasegawa Teru.
- 5 *Esplorado de Vivĝojo* de Hidemaru Deĝuĉi.
- 6 *La Graveco de la Fideligo* de Oscar Wilde (tradukis: William Auld.)
- 7 *Fundamenta Krestomatio* de d-ro L.L. Zamenhof.
- 8 *Esperanto For Beginners* de Trish O'Connor (Kvarhora du-vidbenda kurso por komencantoj, kreita en Aŭstralio.)
- 9 *Aŭtuno en la Printempo* de Ba Jin.
- 10 *Making World Peace Real: The Baha' Faith and Esperanto* de Paul Desailly. (Vidu anonceton sur paĝo 62 de *Jarlibro 2004*).

Krom la ĉi supraj mi pretas sendi diversajn Movad-materialojn i.a. pri la 89a Universala Kongreso en Pekino inkluzive de *Kongresa Libro*.

Amike salutas vin el Kantono.
Paul kaj Velanta (Chen) Desailly.
Building 56 Room 404 Number 81.
Xianlie Zhong Road.
Dongshan District.
Guangzhou. 510070.
pauldesailly@yahoo.com

SKRIBIS BRIAN FOX:

Kiu Mortigis Jesuon?

En *ESK* de marto-aprilo, Tony Peterson skribis, ke “Laŭ la Biblio, la judoj havis la respondecon je la mortigo de Jesuo Kristo.” Ĉu vere? Notu ke Tony diras “la judoj” kaj ne nur “judoj”. Laŭ

Plena Ilustrita Vortaro, “la” montras: “ke la priparolata persono aŭ objekto estas jam konata”, kaj aldonas, “aŭ ke oni parolas pri la tuta speco.” Do, ĉu ĉiuj el la judoj respondecis pri la mortigo de Jesuo? Mi kontrolis en mia Biblio, kaj informiĝis ke dungitoj de la Romia Imperio mortigis

Jesuon.

Legu en Mateo 27.27: “Tiam la soldatoj de la provincestro [de la Romia Imperio], kondukinte Jesuon en la palacon, kolektis al li la tutan kohorton.” Mateo 27.29: “... kaj mokis lin dirante: Saluton, Reĝo de la Judoj!” Mateo 27.35: “Kaj krucuminte lin, ili dividis inter si liajn vestojn, ĵetante lotojn;”.

Legu en Marko 15.15: “Kaj Pilato [Romia prokuratoro], volante kontentigi la homamason, liberigis al ili Barabason, kaj, skurĝinte Jesuon, transdonis lin, por esti krucumita.”

Do, kiel estas ke iuj kredas, ke “la judoj” respondecis pri la mortigo de Jesuo? Ni scias ke venkintoj ĉiam verkas la his-

torion, sed ĉi tie funkcias plia faktoro. Post du jarcentoj, Kristanismo fariĝis la oficiala religio de la Romia Imperio, kaj ili deziris senkulpiĝi sin pri la mortigo de sia Kristo. La tradicio kreskis ke “la judoj” mortigis Jesuon, kiu mem estis judo dum sia tuta vivo.

Persone, mi ne spektos tiun filmon, *La Pasiono de la Kristo*, pro du kialoj: 1. Laŭ revuoj ĝi estas plena da perforto, kaj mi ne deziras apogi perfortajn filmojn. 2. Ŝajnas ke la filmo subtenas la tradicion ke “la judoj” respondecis pri la mortigo de Jesuo, kaj tiu tradicio estis granda influo por la longdaŭra antisemitismo en Eŭropo, kiu kondukis al la Nazia mortigo de milionoj da judoj. □

SKRIBIS FRANCISKA TOUBALE:

Kun intereso legis mi la artikolon de Marcel Leereveld en *ESK* marto/aprilo 2005 kaj konsentas ke se la evento havas la nomon “kursaro”, tio signifas ke la kursoj estas ĝia kerno. Tamen kiam Marcel deklaras ke “Ĉi tiuj (la posttagmezaj elektoj) normale estas pli lingvintensaj ol la ekskursoj, sed la partoprenantoj evidente preferas uzi nian organizon ankaŭ kiel turisman agentejon”, mi devas emfazi ke plejparte la ekskursoj ne estis tiaj, kiajn kutime proponas turisma agentejo, sed malferma pordo sur iu aspekto de la vivo de aliaj esperantistoj, ĉu temas pri komuna ĝardeno, ĉu pri komuna domo. Plie mi opinias ke necesas tiuj momentoj kiam la lernantoj povas malstreĉe uzi la konojn akiritajn dum la matenaj kursoj kaj plu lerni je pli natura metodo. Necesas emocie sperti Esperanton. La amikeca etoso kaj la plezuro de la ekskurso malfermas la menson kaj faciligas la studadon, ligante la lingvajn elementojn al sper-

taĵoj. Nur al tiuj, kiuj ĉiukaze ne profitas la oportunon praktiki la lingvon je ĉiu momento de la somerkursaro, ĉu dum la manĝoj, ĉu dum trinkado en kafejo, ankaŭ la ekskursoj ne estas fruktodonaj. Por la aliaj ili estas intensa praktika aplikado, en ĝoja etoso for de la klasĉambro. Kiu deziras resti en klasĉambro dum tuta tago en somera vetero? Tiam la pli spertaj nature helpas la aliajn. En la adelajdaj busoj kaj trajnoj Esperanto aŭdeblis, la paroloj fluis kaj foje atentigis la aliajn pasaĝerojn.

Estas bedaŭrinde ke la ekzameno-preparado kadre de la pasinta somerkursaro ne okazis je konvena horo, tamen ekskursoj, kiuj ne rompas la lingvan “banon” nepre necesas. Serioza amuzo povas esti fruktodona. Ĉiu el ni lernas laŭ sia propra metodo, do ju pli da diversaj eblecoj estas proponitaj, des pli bone. □



EL VIKTORIO

RAPORTAS JOHN ADAMS

La pasintan sabaton, la 19an de marto, la viktoria federacio decidis viziti Torquay-n, nian hejmurbon, dum sia ĉiujara ekskurso en la kamparon.



Malantaŭe: Karl Egger, Henry Broadbent, Laszlo Farkas, Svetislav Kanaacki, John Adams

Antaŭe: Alida Leereveld, Betty Broadbent, Marcel Leereveld.

Ĉar Viktorio ankoraŭ uzas somertempon, necesis vekiĝi en la mallumo por veturi al Spencer Street Railway Station en Melburno por trafi la trajnon al Warrnambool je 8.48atm. Ili atingis Warrnamboolon, kie ili transiris al buso por atingi Torquayn je 10.30atm.

Mia frato kaj mi renkontis la grupon je bushaltejo, kun du aŭtoj kaj veturigis ilin al nia hejmo proksime al la plaĝo por la matena tepaŭzo.

La tago estis bela kaj varma, kaj la grupo fervoris marŝi. Ni marŝis rekte sur la plaĝon al vasta sablaro. Ĉar estis proksime al la Pasko, la tajdoj estas ekstremaj kaj ĉifoje estis ekstreme malalta tajdo. Bonega oportuno marŝi sur firma sablaro.

Ni celis suden kaj post du kilometroj atingis lokon, kiun ni la ĉeloĝantoj nomas “agrabla angulo”: ĉar la plaĝo kurbiĝas orienten, tiel ke dumvintre ĝin trafas la plena sunlumo elnorda kaj la sablomontetoj kaj la pretera tero protektas la plaĝon kontraŭ la kutima malvarma suda vento. Nin fotis mia frato, post nia transiro de mallarĝa terkolo, kun la Surfoplaĝo Torquay en la fono.

Ni reiris hejmen laŭ la facila vojo sur la gazonoj alte super la plaĝo, kio ebligis al ni pli bone spekti la hejmojn kaj apartamentojn unuflanke kaj la oceanon aliflanke. Mi indikis la buŝon de Golfo Haveno Phillip, fore videblan, kaj ni menciis ke estas nenio inter Torquay kaj la Suda Poluso, tial okazas la vintraj ventegoj.

Negranda devojo de la plaĝo al la gastodomo de Carol Lutz ebligis por ni iom da tre meritita likva refreŝiĝo. Nin gvidis ĉirkaŭ siaj loĝejoj Carol, Miranda, ŝia frato Andrew, kaj Luko. Ni vizitis kuriozan hobibutiketon ĉe angulo de ilia parcelo, kiu efektive estis origine tre malnova buĉista butiketo.

Post tio, hejmen, kie ni kolapsis en seĝojn por lunĉi per varma supo kaj poste smorgasbordo. Ni profitis la oportunon informiĝi pri okazintaĵoj kaj aŭskulti sonkasedon de la dissendo el la pasinta semajno de radio 3zzz, pri kiu la grupo multe okupiĝas.

3.20 ptm, la horo por trafi la buson je 3.40 retroen al Geelong, por reatingi Melburnon je 5.33ptm. □

EN ADELAJDO REKLAMILOJ DUPIEDAJ KAJ FLUGANTAJ

Sciigi la neesperantan publikon pri la ekzisto kaj pri la valoroj de esperanto estas tre grava tasko, ofte neglektata. Kiam la aperigitaj anoncoj pri esperantokursoj en ĵurnaloj ne alportas la deziratan efikon, oni ofte rezignas, senesperigigas.

Ni en Adelajdo provis du novajn metodojn.

La unuan elpensis Sandor Horvath uzante la komunuman feston okaze de la Harmonio-Tago en Clarence-Park-Centro. Li starigis tablon kun kelkaj esperantaĵoj kaj invitis Trevor kaj Katja Steele-n kiel ekzemplojn de “vivanta esperanto”. Ili mallonge parolis pri tio, kion esperanto signifas al ili kaj kiel ĝi riĉigis iliajn vivojn. Ĉar Katja ankoraŭ ne bone parolas la anglan, ŝi parolis en nia lingvo — kaj la pli ol centoj da ĉeestantoj verŝajne la unuan fojon aŭdis parolatan, vivantan esperanton.

Kaj la fluganta reklamilo? Ĝi estis esperanto-kajto, kiun ni preparis por la kajtofestivalo okazinta la paskan lundon ĉe la marbordo en la antaŭurbo Semaphore. Estis belega tago, la promenejo plenis de homoj kaj la ĉielo de gigantaj multspecaj kajtoj. Verdire, tiu nia estis kompare al ili modesta kaj ne tre kapable fluganta, sed ni ĝuis la eventon, atentigis almenaŭ



Supre: la kajtofestivalo.

Maldekstre: Trevor kun la esperanta kajto

kelkopon da homoj pri la ekzisto de esperanto kaj de esperantistoj, kaj ni promesas venontjare plibonigi nian prezenton.

En ambaŭ kazoj ni lokaj esperantistoj agrable kunmanĝis kaj Sandor eternigis la eventojn per sia fotilo.

K.Steele

🦋 por ridigi vin 🦋

Informado: Fuŝas bastonuloj

Hideg opinias ke ĵurnalistoj konsideras Esperanton kiel stranga hobbio pro la apero de stanguloj.

(el *Protokolo de seminario pri informado*: Poprad, 1992)

Nupta plezuro?

La paroprenantoj de la kunveno forveturis hejmen esperoplenaj...

(el *La Verda Kolombo* 1993: 2)

laŭ *La ondo de esperanto*

LA NOVA ESTRARO DE AEA



MARCEL LEEREVELD: PREZIDANTO



Jenny Bishop (helpkasisto), Miranda Lutz sekretario, Marcel Leereveld (prezidanto), Ŝandor Horvath (vicprezidanto), Penny Vos-Pym (vicprezidanto), Henry Broadbent, Steve Pitney (kaskisto)



• recenzas marcel leereveld

Bob Felby: *Malgrava historieto pri mia vivo*. AEA, 2005. 126 paĝoj, vinktitaj.

Takso: 🍷🍷🍷🍷



La verko estas mal-detala si-biografio, sed priskribas la plej elstarajn okazaĵojn de la tuta vivo de la aŭtoro, kies karaktero kaj amo al bestoj bone reliefiĝas. La

enhavo estas ĉiam interesa, kaj pro lia humoro eĉ tiam, kiam Bob ripetas similajn okazaĵojn. La travivaĵoj kelkfoje lumigas situaciojn el nekonvenca aspekto. Ili tre interesos danojn kaj anglojn, ĉar Bob vole-nevole komparas la du popolojn, sen fina juĝo. La libro montras al ni, kiom gravaj por nia mensostato povas esti ŝajne negravaj okazaĵoj kaj situacioj, kaj kiom riĉa la ordinara vivo povas esti, kaj kiom da loko esperanto povas okupi en tia nur ŝajne ordinara vivo.

La stilo estas facile legebla, la vortostoko, escepte de la priskribo de kelkaj teĥnikaĵoj, estas malgranda kaj komuna kaj la gramatikaĵoj facilkompreneblaj kaj seneraraj. Iom nekutimas lia ludo pri la vicordo de frazpartoj (“Lin mi invitis veni”; “Estis el Londono senditaj multaj donacoj”). Li tute sen emfazo aŭ eĉ klarigo de tempo al tempo enmetas ion stultan de li faritan, sed kiel simplan fakton inter la aliaj faktoj (“Mi kompreneble maltrafis la vagonaron”; “Mi estis en la lito kun miaj du katoj” [kiam li patriĝis]; “Ofte mi pentas, ke mi povis tiel agi”; “Ni ŝtelis de li ankaŭ brasik- kaj sukerrapojn”).

Mi trovis kelkajn personapartaĵojn [Idiosyncrasies]: “Bone, eĉ bonege”, k.t.

p.” Malalta konstruaĵo ĝi datiĝas el 1763”; “Mi ne povis trovi Bryan kaj li ne povis trovi min”. Simile la kelkajn ĝermanecajn sintezaĵojn: “Mi ree enmalsanulejiĝis”; “ŝipkonstruejlaboristoj”; “aŭtomobilrestadigejo”; “malsanulveturilveturigisto”. Kelkfoje uzatas gramatike nekutimaj ĝustaĵoj: “aliies”; “aliiu”; “aliiie”; “sigarda”; “Preni parton en kongreso”; “ree”; “Anglujo kaj Germanujo”; “oni punatas, se” k.t.p. Kelkaj esprimoj ne estas sufiĉe internacie kompreneblaj: “Ejsberg la anuso de Danlando”; “mia juna cerbo, sur kiu ne kreskis herbo”.

Kvankam la gramatiko estas tre bona, enestas kelkaj eraroj: “La memama frenezulo”; “perlabori monon”; “Sur tio ili malmanĝis kaj maltrinkis”; “Li sentis sin malpli [= pli] valora ol mi”; “mi pagatis”.

La libro estas plena de ŝercoj, de ridindaĵoj, de ŝajnaj naivecoj, de sekaj humorajoj, de ironioj, kaj kelkfoje de sarkasmoj:

“Mi forferis al reĝo Neptuno la tagmanĝon”; “la kuracistino rigardis profunden en mian gorĝon kaj mi esperas, ke ŝi ne vidis ĝis la interno de mia postaĵo”.

“La Okcidenta Maro, kiun la angloj misnomas Norda Maro”; “kvankam ankaŭ ni havis aristokratajn stomakojn”; “estis multaj frenezulejoj en Danlando; Hamleto pravis, ĉu ne?”; “ĉar mi estas honestulo”; “mi ne havas naturan talenton por rabotado”; “Mi ne sciis, ke ratoj estas tiom kruelaj”; “Linda, kiu intertempe naskiĝis”.

“La strigo salutis min kaj mi salutis ĝin”; “nederlandano, kiu jam satiĝis de la angloj”; “Kiam mi antaŭ multaj jaroj


naskiĝis, mi ne sciis, kian vivon mi havos”; “Estas la dana logiko tre stranga, ĉu ne?”

“La angloj, la superhomoj, sed la lokomotivo estis tre malnova, kaj la vagonfenestroj anglaj ne estis tute fermoblaj”; “Anglujo estas lando deca, ĉu ne”;

“ni decidis reiri al lando pli homama, al Anglujo”; “sed li estis inteligenta” (ne sciante la diferencon inter Nederlando kaj Danujo); “li paroladis, sed nenion diris”.

Entute la libro estas tre leginda kaj mi povas rekomendi ĝin al ĉiuj, elde komencantoj al spertuloj. □

ESPERANTO EN AŬSTRALIA POŝTMARKO 1986



En antaŭa numero de *ENK* ni erare esprimis dubon pri aserto ke en Aŭstralio eldoniĝis esperantolingva poŝtmarko. Nia membro Rolf Ahrens bonvolis sendi al ni foton de koverto eldonita en 1986, okaze de la 21a konferenco de la internacia estraro de Internacia Policista Asocio. Sur ĝi estas poŝtmarko en kies malsupra parto estas la vortoj “Servo per amikeco”:



Rolf komentas: Preskaŭ neniuj de la membroj de IPA scias ke la enskribo estas en esperanto. Iuj demandis al mi ĉu ĝi estas en la latina aŭ io... !” □

PROTOKOLO DE LA ĜENERALA KUNVENO DE AEA, ADELAJDO JANUARO 2005

JE LA 11A KAJ 14A JANUARO 2005 EN SALONO ZAMENHOF, LINCOLN COLLEGE,
ADELAIDE, SA.

RAPORTAS MIRANDA LUTZ

SEKRETARIO DE AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Bonvenigaj vortoj de la Vicprezidanto: Jenny Bishop anstataŭis Mateo Maguire-n kiel prezidanto.

Ĉeestantoj: 27 subskribis siajn nomojn, do estis kvorumo.

Pardonpetoj pro neĉeesto: Bernie Heinze, Mateo Maguire, Johano Gallagher.

Forpasoj: John Harvey, Terri Metherall, Stan Bruton, filo de Don Broadribb, Clara Gleeson. La ĉeestantoj memsilentigis sin dum unu minuto por rememori la forpasintojn.

Protokolo de la AEA-jarkunveno en Januaro 2004

La protokolo aperis en la Majo-Junio 2004 numero de *Suda Kruco* kaj estis donita al la ĉeestantoj kaj oni petis ilin fari komentojn. La ŝanĝoj estas sube:

Aldonu sub la ĉeftitolo: *por la jaro Julio 2003 al Junio 2004*

Aldonu ankaŭ: *okazis ĉe Redcliffe, Januaro 2004*

Anstataŭ Narimbula ĉe la lasta titolo skribu: *Merimbula*

Aldonu inter “proponon” kaj “ke” sub titolo “*lernejo Treetops*” la vortojn de *Hazel Green kaj Marcel Leereveld*.

Anstataŭ “*Mezlernejo*” sub titolo *Dis-kutendaj aferoj* skribu “*Kompanio*”.

Ĉe la titolo “*jarreportoj*”, en la unua alineo, forstreu ĉion post “Dianne Mitchell” kaj anstataŭe skribu: *proponis Sid Wolifson, aĝulo de la jaro. Subtenis Terry Manley kaj akceptita.*

Proponis Henry Broadbent “ke la protokolo akceptatu kun la ses ŝanĝoj”. Subtenis Hazel Green.

Voĉdono: *Akceptita—Por 15, kontraŭ 0, sindetenoj 2*

KORESPONDADO

Henry sendis unu dankan leteron — Jenny menciis du leterojn, sed ili ne rilatis al la kunveno.

RAPORTOJ

Jarraportoj

Jarraporto de la Vicprezidanto laŭtleĝita. Jenny Bishop, vicprezidanto, preparis la raporton por 2004 anstataŭ Mateo Maguire, kiu ne povis ĉeesti ĉar li nun laboras en Hongkongo.

Kasista raporto: Stephen Pitney legis la raporton kaj la sekvaj aferoj diskutatis.

La situacio de la impostoj sur testamentaĵoj kaj enspezo estas ankoraŭ ne klara. Ni eble devos pagi 30%-impoŝton. La leĝo ŝanĝiĝos en ĉi tiu jaro kaj mi devus scii baldaŭ la novan aranĝon.

La T&I Einiovici International Travel

Fund: Marcel diris ke la celo estas helpi junulojn eksterlanden vojaĝi. Ĉi tiu fonduso estis en aparta konto kaj iu proponis ke ni devus meti ĝin en la saman konton kun la alia mono. Marcel proponis, ke iu enketu ĉe la heredintoj de la doninto ĉu ni povos meti la monon en stipendian konton, sub la nomo de AEA. *Stephen Pitney enketos kaj raportos al la sekva kunveno.*

Sudaŭstralia konto por somerkursoj. Ĉi tiu konto komenciĝis antaŭ multaj jaroj kaj ĉirkaŭ \$5000 sidas ĉi tie. Indrani Beharry-Lall proponis ke la SA Komitato fermu la konton kaj la SA Federacio prenu 50% kaj la AEA prenu 50%. Marcel proponis ke “*Ni nun demandu la Adelajdanojn ĉu ili konsentas al la propono de Indrani. Se ili konsentas, la konto fermiĝu kaj la mono dividiĝu.*” Subtenis Max Wearing.

Voĉdono: *Akceptita*—por:6, kon:0, sin 1.

Ralph Harry — Testamento. Jenny por AEA ricevis leteron de la filino de Ralph Harry kaj anticipis ke AEA ricevos la ĉekon. Klubo Manly ricevis ĉekon por \$25 000 kun letero. Ili metis la monon en sian konton. Antonio Gaskell, prezidanto de Klubo Manly, opiniis ke lia klubo ne devos pagi imposton ĉar ili havas malpli ol \$50,000. *La du leteroj presiĝos en Suda Kruco por helpi decidi kiun organizon Ralph Harry celis por la testamento. Se necese ni devos demandi la filinon de Ralph.*

Respondulo

AEA estas registrita kompanio. AEA devas translokigi la loĝejon de la respondulo (Public Officer) al Viktorio.

Impostoj

Proponis: Stephen Pitney “ke AEA devas trovi iun kiu povas zorgi pri la impostoj”.

Subtenis: Hazel Green.

Voĉdono: *Akceptita*—por: 20, kon: 0, sin:1

RAPORTO DE SVETISLAV KANAĈKI PRI LA RADIO-PROGRAMO DE 3ZZZ

La kunveno multe dankis al Svetislav pro la raporto kiu estis ricevita.

RAPORTO DE HAZEL GREEN PRI LA KORESPONDKURSA SERVO DE AEA 2004

La kunveno multe dankis al Hazel pro la raporto kiun ŝi donis.

RAPORTO DE MARCEL LEEREVELD PRI EKZAMENOJ

Marcel donis malgrandan raporton kaj la homoj aplaudis por danki lin.

ELEKTOJ

PREZIDANTO

Estis du proponoj por prezidanto:

(1) *Propono:* Marcel Leereveld
Proponis: Svetislav Kanaĉki
Subtenis: Franciska Toubale

(2) *Propono:* Penny Vos-Pym
Proponis: Dianne Lukes
Subtenis: Max Wearing

Post diskutado de multaj membroj kaj malgrandaj elektaj petoj, Marcel estis elektita per sekreta balotado.

VICPREZIDANTOJ

(1) *Propono:* Penny Vos-Pym
Proponis: Dianne Lukes
Subtenis: Max Wearing

(2) *Propono:* Ŝandor Horvath

Proponis: Henry Broadbent

Subtenis: Stephen Pitney

(3) *Propono*: Jenny Bishop

Proponis: Stephen Pitney

Subtenis: Ŝandor Horvath

La voĉdono okazis per sekreta balotado, oni skribis du nomojn sur paperon. Ŝandor kaj Penny gajnis.

SEKRETARIO

Propono: Miranda Lutz

Proponis: Ĵeni Bishop

Subtenis: Stephen Pitney

Miranda estis elektita pro la manko de aliaj proponoj.

VICSEKRETARIO

(1) *Propono*: Trish O'Connor

Proponis: Stephen Pitney

Subtenis: Jenny Bishop

(2) *Propono*: Henry Broadbent

Proponis: Franciska Toubale

Subtenis: Hazel Green

Henry estis elektita per sekreta balotado.

KASISTO

Propono: Stephen Pitney

Proponis: Jenny Bishop

Subtenis: Henry Broadbent

Neniu alia estis proponita, do Stephen estis elektita.

VICKASISTO

(1) *Propono*: Ken Rolls

Proponis: Hazel Green

Subtenis: Penny Vos-Pym

(2) *Propono*: Jenny Bishop

Proponis: Penny Vos-Pym

Subtenis: Dianne Lukes

Jenny Bishop estis elektita per manleva voĉdono. *Por*: Jenny = 17, Ken = 3

Fino de tiu kunveno ĝis Vendredo 14-an de januaro.

VENDREDON 14-AN DE JANUARO DAŬRIS LA KUNVENO

Malfermo: 15.43

Ĉeestantoj: 27 subskribis siajn nomojn.

RAPORTO DE DIANNE LUKES PRI INDONEZIO

Dianne faris raporton pri la nuntempa situacio de Esperanto en Indonezio. Dianne proponis ke AEA subtenu Hazarin en lia laboro por Esperanto. La proponoj estas por prepari Indonezilingvan vortaron, komputilo, studlibroj, ktp.

Dianne proponis: \$5000 por la unua jaro (2005); kaj en 2006: \$4000; 2007: \$3000; 2008: \$2000; 2009: \$1000.

Kelkaj demandoj sekvis la raporton.

Propono: ke la kunveno akceptu la raporton de Dianne Lukes

Proponis: Terry Manly

Subtenis: Sandra Connors

La kunveno ne voĉdonis.

RAPORTO DE PENNY VOS-PYM PRI ILEI

Penny parolis pri Esperanto nuntempe en lernejoj en Aŭstralio.

Diskuto okazis kaj Debra McCarney konsentis ke estas malfacile akiri informon pri LOTE-instruebleco en Aŭstralio.

Propono: ke la raporto de Penny akceptatu.

Proponis: Hazel Green

Subtenis: Igor Couto

La voĉdono estis per mano kaj la propono estis akceptita (*Por*: 20)

REPREZENTANTO DE UEA-ĈEFDELEGITO

Ŝandor estis komitatano dum 2004 kaj li akceptis resti dum 2 pliaj jaroj.

MEDALIONO TORR

La gajninto de la premio por 2004 por la instruisto kiu instruis esperanton al la plej granda kvanto de infanoj estas Saani Bennetts. Ŝi akceptis kaj Penny transdonos ĝin al ŝi poste.

FRATULOJ

La novaj fratuloj estu Bob Felby kaj Hazel Green. Ili akceptis la honoron kun surprizo.

DUMVIVA MEMBRO

Terry Manley proponis dum 2004 ke Robbie Robertson, pasinta prezidanto de AEA estu dumviva membro.

KOTIZO POR MEMBRARO

Propono: ke ni ne ŝanĝu la kotizon por 2004/2005 — ĝi restu sama

Proponis: Stephen Pitney

Subtenis: Hazel Green

Voĉdono: *Akceptita*—*por*: 26, *kon*: 0, *sin*: 1

Propono: ke ni kreu novan kategorion de membreco — speciala senpaga por infanoj ĉe lernejoj por unu jaro 2005, ili ricevos glumarkojn, atestilojn aŭ similan (ne *ESK* aŭ voĉdonpermeson)

Proponis: Terry Manly

Subtenis: Dianne Lukes

Voĉdono: *Akceptita*—*Por*: 18, *kon*: 0, *sin*: 0

ĜENERALAJ ŜTATAJ MEMBROJ

Ĉiuj ŝtatoj (federacioj aŭ organizoj) de Aŭstralio devas doni al la estraro la nomon de sia reprezentanto.

SUBVENCIO POR 3ZZZ

Propono: ke AEA garantiu la daŭrigon de la 3ZZZ-programo per ne pli ol \$2000 se tiu sumo estos bezonata.

Proponis: Marcel Leereveld

Subtenis: Hazel Green

Voĉdono: *Akceptita*—*Por*: 11, *kon*: 5, *sin*: 6

Propono: ke AEA subtenu la 3ZZZ-radiotonon per \$1000

Proponis: Laszlo Farkas

Subtenis: Jenny Bishop

Voĉdono: *Akceptita*—*Por*: 20, *kon*: 0, *sin*: 1

SAS-SOMERLERNEJA MONO

Propono: ke la sumo en la bankkonto de la Sudaŭstria Somerlernejo je 30a Junio 2004 dividiĝu duone inter AEA kaj Esperanto en Sudaŭstralio.

Proponis: Stephen Pitney

Subtenis: Jenny Bishop

Voĉdono: *Akceptita*—*Por*: 20, *kon*: 0, *sin*: 0

NOVAJ SIMBOLOJ POR AEA

Igor Couto faris raporton/prelegon pri la uzado de komputilo/interreto nuntempe. Li volentis helpi la movadon pri tiu laboro kaj kredas ke AEA devas krei nian propran identigan simbolon kaj plibonigi la hejmpaĝon de AEA.

Propono: Ke ni uzu la aĝintan paperon unue, kaj poste ni uzu la novajn simbolojn

Proponis: Marcel Leereveld

Subtenis: Franciska Toubale

Voĉdono: *Akceptita*—*Por*: 15, *kon*: 1, *sin*: 0

Propono: ke ni elektu unu el la tri novaj simboloj kiujn Igor proponis, numeroj 1, 2 aŭ 3

Proponis: Terry Manly

Subtenis: Ŝandor Horvath

Voĉdono: 3 = 1, 2 = 3, 1 = 4

Simbolo numero 3 estis akceptita



Propono: Ke ni donu ne pli ol \$2000 dum 2005 por plibonigi la komunikaĵojn kaj broŝuron per la helpo de Igor.

Proponis: Stephen Pitney

Subtenis: Hazel Green

Voĉdono: Akceptita–Por:20, kon:0, sin:0

KONSILO DE KONTROLISTO

Propono: konforme al la konsilo de la kontrolisto, la kasisto akiros profesion konsilon pri financaj kaj leĝaj aferoj, imposto, kaj asekuro, kiel la estraro opinias esti bezonata, buĝeto = \$3,000.

Proponis: Stephen Pitney

Subtenis: Dianne Lukes kaj Terry Manly

Voĉdono: Akceptita–Por:14, kon:0, sin:0

Dianne diris ke ŝia bofrato kiu havas “MBA” eble povus helpi nin.

PRUNTEDONO AL SAT POR PIV

Propono: ke AEA pruntedonu \$5,000 al SAT por kontribui al nova eldono de PIV (*Plena Ilustrita Vortaro*)

Proponis: Franciska Toubale

Subtenis: Hazel Green

Voĉdono: Akceptita–Por:12, kon:3, sin:1

LIBROSERVO

Franciska volis mencii ke pasintjare okazis kelkaj fuŝoj, ke kelkaj personoj ne ricevis kion ili abonis.

La estraro daŭrigos komunikadon kun Nicole Else pri la daŭrigo kaj laboro por la libroservo.

LA KONGRESO REKUNVENIS JE DIMANĈO 16an DE JANUARO JE 10:40ATM.

17 membroj ĉeestis kun 5 voĉrajtigiloj (tenitaj de Marcel)

Bondeziroj

Marcel legis leteron de bonveno senditan de Atilio

Libro de Terry Manley

La Estraro jam decidis doni al Terry Manly \$75 por kostoj de lia libro kiu eldonatos en 2006: AEA historio 1985–2005.

Vojaĝstipendo

Propono de Marcel, ke ni lasu la Estraron aranĝi stipendion por Nicole Else

Subtenis Stephen.

Voĉdono: Akceptita–Por:16, kon:0, sin:0

Anonco de la Oceana Komitato

La Estraro decidis, ke ni proponu al UEA ke Bradley McDonald estu la Kunaganto de la Oceania kaj Indonezia aggrupo. Jenny listis la membrojn: Bradley, Penny, Debra, Jonathan, Jenny kaj Dianne. Aliaj membroj per invito.

Subvencio por Indonezio

Multaj diskutis pri la celo de mono por Indonezio. Unue por komputilo kaj libroj,

papero, subvencio por Hazarin, ktp.

Proponis Dianne, ke la Estraro donu monon por Indonezio – minimumo de \$1000 ĝis \$5000, la \$1000 tuj. Marcel proponis ke ni sendu nun \$1000, kaj ke ni sendu pli da mono per Dianne Lukes, se ni ricevos raporton kiu diras ke la laboro fartas bone, kaj detalan, kontentigan planon por uzi pli da mono.

Subtenis Hazel.

Voĉdono: *Akceptita*–por:12, kon:6, sin:0

Subvencio por Somerkursaro

Proponis Marcel, ke ni limigu la elspezojn por somerkursaro al \$2000 por eksterlandanoj.

Subtenis Stephen.

Voĉdono: *Akceptita*–por:16, kon:0, sin:1

Aliaj Subvencioj

Proponis Jenny, ke AEA limigu elspezojn por komencantaj instruistoj al \$20 000 = \$4000 por ĉiu ŝtato.

Subtenis Marcel.

Voĉdono: *Akceptita*–por:18, kon:0, sin:0

Estontaj Kongresoj

Proponis Marcel, ke ni havu somerkursaron ĉiun duan jaron kaj kongreson ĉiun jaron, kompreneble kun la somerkursaro.

Subtenis Jenny.

Voĉdono: *Malakceptita*–por:10, kon:14, sin:0

Proponis Hazel, ke ni akceptu la inviton de Penny aranĝi kongreson aŭ somerkursaron en taŭga loko.

Subtenis Sandor.

Voĉdono: *Akceptita*–por:14, kon:0, sin:7

Penny menciis, ke ŝi konas lokon kiu ne

kostos pli ol ni pagas ĉi tie ĉe Lincoln College malgraŭ la feria sezono.

Fratuloj

Marcel, kiel Prezidanto, gratulas Hazel-on kaj Bob-on pro ilia honorigo kiel Fratuloj.

Proponis Marcel, ke AEA ne daŭrigu la nomumadon de Fratuloj kaj ke post la raporto en *ESK*, laŭ ĉi tiu Generala Kunveno, AEA ne plu aperigu en sia *Adresaro* la liston de Fratuloj, kaj Hazel kaj Bob estu la lastaj Fratuloj.

Subtenis Bob.

Voĉdono: *Akceptita*–por:15, kon:0, sin:3

Aliaj Propozoj

Dato de la venonta kongreso

Proponis Marcel, ke la dato de la venonta kongreso estu januaro 2006

Subtenis Jenny.

Voĉdono: *Akceptita*–por:16, kon:0, sin:0

por ridigi vin

Nupta plezuro?

La paroprenantoj de la kunveno forveturis hejmen esperoplenaj... (La Verda Kolombo 1993: 2)

Ni semas kaj semas

Mi kuris la tutan Japanlandon (...) por prelegi kaj fondi entute 120 lokajn filinojn. (Sumi Yukawa // *Monda Forumo* 1992: 4)

Spita sputo memorinda

M.R. Ŝtefanik rangis kiel divizia generalo de la franca armeo kaj kraĉis la 4-an de majo 1919 en Vajnory ĉe Bratislava. (Informilo: monata gazeto de handikapuloj, 1993: jun)

Blasfemi kontraŭ mispresoj

La redakcioj de la font-periodaĵoj devas elsakri tiajn erarojn... (Bernard Golden // *Eventoj* 1993: sep/1)

La estonteco estis nia

La Esperanto-movado en Aŭstrio ankoraŭ ne stagnas. (Internacia Fervojistoj 1996: 6)

el *La ondo de esperanto*

NI HAVAS FAMILION!

DE KATJA STEELE

Pli precize: ni havas multajn familiojn! Esperanto-familiojn. Tion ni konstatis dum la antaŭnelonge finiĝinta adelajda somerkursaro. Ili estas kazoj, kiam almenaŭ 2 el la familio (plenkreskulo aŭ infano) parolas aŭ lernas nian lingvon. La “vera” esperanto-familio estus tia, kie esperanto estas familia lingvo. Grandparte tial familioj grupiĝas en la Rondo Familia de UEA.

Kun la novelektita estraro de AEA, la esperanto-familioj ĉeestantaj la adelajdan somerkursaron kaj kun junaj instruistinoj de elementaj lernejoj — ontaj esperanto-instruistinoj (ankaŭ partoprenintaj la kursaron), ni decidis fondi propran aŭstralian familian rondeton, kies celo estas informado, instigo, inspiro, reciproka subteno. La membrojn registras Katja Steele (52 Exmouth Rd., Glanville SA 5015. steele_trevor@hotmail.com), kiu zorgos pri ilia grupa ligo al la Rondo Familia de UEA.

Jen kelkaj el niaj familioj:

Tasmanion reprezentis Lesley Galagher kun sia filino Jasmine.



Penny Vos esperantigis siajn 3 filinojn: Heidi, Freya kaj Amy kaj eĉ sian novan edzon. Laŭ Penny la rondo ankoraŭ ne fermiĝis, ja lernas la lingvon ankaŭ ŝiaj gepatroj.



El Novzelando venis al la somerkursaro Bradley McDonald kun sia 13-jara filino Benita.

(Ankaŭ la edzino de Bradley, Neelam, subtenas Esperanton.)


Nicole Else el Sidnejo estas 3a-generacia, ŝia filo Dominic 4a-generacia esperantisto, de ilia familio.

(Esperantistoj estas ankaŭ 2 onkinoj, 1 onklo kaj esperanton konas ankaŭ la eksedzo de Nicole.)



John Abood estas dentisto, esperantisto de 1987. Lia edzino Nadia laboras kiel mezlerneja instruistino (instruas ĥemi-on), dum ASEK ŝi partoprenis la kurson por komencantoj. Naysan estas 9-jara kaj je granda feliĉo de sia patro en Adelajdo li proprainiciate aĉetis por si esperanto-vortareton. John tre ŝatus, ke lia filo havus eblon ekzerci sin je la lingvo.

Miranda Lutz kun edzo Andrew kaj filo Luke estas esperantistoj el Viktorio.



En Adelajdo estas esperanto-familio Sandor Horvath kaj Helen Palmer. Bone lernis la lingvon kaj jam aktivis Patricia, la patrino de Helen.

La somerkursaron partoprenis eĉ iliaj najbaroj: Ashley Campbell kaj Annie Gleeson.

Bob kaj Audrey Felby esperantumas jam de jardekoj.

Katja kaj Trevor Steele uzas Esperanton kiel familian lingvon. David, la filo de Trevor, estas denaska esperantisto.

Jenny Bishop estas 3a-generacia esperantisto de sia familio. Ŝi esperas, ke la torĉon pluportos ŝia nepino.

Beth, la edzino de Max Wearing, ankaŭ lernas Esperanton.

Fervoraj adelajdaj esperantistoj estas geedzoj Arthur kaj Elizabeth Mortimer.

Interesaj retpaĝoj por vi:

Galerio de esperanto-familioj: <http://familioj.komputilo.org>

Reta diskutejo: informoj ĉe jouko.lindstedt@helsinki.fi

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas kontribuojn per e-poŝto. Paperaj tekstoj devas esti klare tajpitaj per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Limdato por la julio-aŭgusta numero: 15a de junio 2005

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.



La Aŭstralia Esperanto-Asocio

P. O. Box 419 • Manly NSW 2095 • Australia

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: Marcel Leereveld | prezidanto@esperanto.org.au

Sekretario: Miranda Lutz | sekretario@esperanto.org.au

Kasisto: Stephen Pitney | kasisto@esperanto.org.au

Membreco: \$30 por individuo aŭ klubo [+ \$5 por familiano(j) ĉe la sama adreso].

Por sudento aŭ pensiulo: \$20. Asocia membreco: \$10.

Pagu al la Libroservo de AEA ĉe 143 Lawson St, Redfern NSW 2016.



La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

P. O. Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • New Zealand

<http://www.esperanto.org.nz/>

Prezidanto: Bradley McDonald | bradley.m@xtra.co.nz

Kasisto: Jackie Fox

Sekretario: Howard Gravatt | hgravatt@ihug.co.nz

Membreco: \$40 por individuo, \$50 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo (<20-Jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano.

Sendu vian kotizon al la Kasisto ĉe la asocia adreso.

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €23,70. Pagu al la konto ael-w ĉe UEA, por la Libroservo de Aŭstralia Esperanto Asocio.

Wholly printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302.

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

if undeliverable return reply paid to:

D. Broadribb • P. O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

Print Post Approved:

PP631048/00005

**SURFACE
MAIL**

POSTAGE
PAID
AUSTRALIA